

# EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo  
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 8  
AUG. 1951

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Vusman—Bandito, Murdisto kaj  
Usona Spiono

La Junaj Pioniroj en Nova Ĉinio  
"Bien-tigroj" Detronigas

Kan Kaj-hua—Heroino en Sub-  
jugado de Huaj-Rivero

Epizodo el la Longa Marŝo



## La Ĉina Armea Tago

**Celebra Kunveno**

31-a de julio por honori la Armean Tagon, la unua de Aŭgusto, je la 24a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Inter la 800 ĉeestantoj estis Ĉefkomandanto Ĉu Teh (朱德) kaj Liu Ŝaŭ-ĉi (劉少奇), ambaŭ Viceprezidantoj de la Centra Popola Registaro kaj de la Popola Revolucia Milita Konsilo; ĉefministro Ĉou En-laj (周恩來), Viceprezidanto de la Popola Revolucia Milita Konsilo; Li Ki-ŝen (李濟深) kaj Ĉang Lan (張瀾), Viceprezidantoj de la Centra Popola Registaro; Kuo Mo-jo (郭沫若), Ĉen Su-tung (陳叔通) kaj Sen Kjun-ju (沈鈞儒), Viceprezidantoj de la Tutlanda Komitato de la Politika Konsilia Konferenco de la Ĉina Popolo; aliaj ĉefaj membroj le la diversaj demokrataj partioj kaj grupoj kaj institucioj de la Centra Popola Registaro; altrangaj oficiroj de la Popola Liberiga Armeo, batalherooj kaj reprezentantoj de la ĉinaj popolaj volontuloj. Ĉeestis ankaŭ membroj de la Vietnamia Popola Delegacio.

Post la ludo de la Nacia Himno kaj la Marŝa Kanto de la Popola Liberiga Armeo, Ĉefkomandanto Ĉu Teh parolis al la kunvenantoj. Li diris, interalie, "Dudek kvar jaroj jam forpasis de post la Nanĉanga (南昌) Ribelo de Aŭgusto, 1937. Dum ĉi tiuj dudek kelkaj jaroj, la ĉina popolo, depende de sia propra armeo, batalis kontraŭ siaj internaj kaj eksteraj malamikoj, antaŭen puŝis la aferon de nacia sendependece kaj popola demokratio, kaj fine renversis la regadon de imperiismo kaj la internaj reakciaj fortoj en Ĉinio, kaj liberigis la tutan ĉestron akirante grandan venkon en la popola revolucia milito. La armeo mem ankaŭ kreskis el la malgranda forto en la komenco de la periodo de ribelo en la nunajn potencajn armitajn fortojn. Tio estas la rezulto de korekta gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung, de sinferoj de sennombraj revoluciaj martiroj kiuj verŝis sian sangon, de heroaj luktoj de ĉiuj kamaradoj, de entuziasma subteno kaj kuna peno de la diversaj revoluciaj klasoj kaj popoloj de la diversaj nacioj en Ĉinio kaj de la simpatia subteno de niaj Sovetiaj amikoj kaj progresaj homoj tra la mondo. La granda venko de la revolucia milito de la ĉina popolo kaj la kresko kaj disvolviĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas indaj je nia tutkora celebrado.

"La Popola Liberiga Milito jam venkis sed ni ankoraŭ havas antaŭ ni gravajn taskojn. La malamikoj de la ĉina popolo, la restajoj de Ĉiang Kaj-ŝeka banditaro kaj Usona imperiismo, ankoraŭ okupas nian Tajvanon kaj ne forlasis siajn planojn por spionaj kaj banditaj agoj kontraŭ Ĉinio kaj armitaj surterigoj laŭ nia marbordo. Usonaj imperiistoj ne nur barbare kaj perforte regas nian Tajvanon kaj invadas nian najbaron Koreio, sed foje antaŭen puŝiĝis ĝis la bordo de Jalu-Rivero per siaj armitaj fortoj. La Usona aera forto daŭrigis ĝis nun siajn senĉesajn provokojn en nia Nordoriento. Usonaj kaj britaj imperiistoj ŝiris internaciajn kontraktojn kaj pretas efektiviĝi unuflankan pacon kun Japanio kaj senracie forrabis de la Ĉina Popola Respubliko ĝian rajton partopreni en la preparo de pacotraktato.

"La Usonaj invadantoj aktive rearman Japanion kaj planas la daŭran okupon de Japanio kaj la suda parto de Koreio. Usonaj imperiistoj

plurfoje deklaris publike ke ĝi daŭrigos sian malamikecon kontraŭ la ĉina popolo kaj siajn penojn subfosi la popoldemokratian novan Ĉinion. Nun ambaŭ flankoj en la Korea Milito kondukas armisticajn intertraktojn. Estas sendube nia ĉiama espero ke efektiviĝos armistico kaj estiĝos ebleco pace solvi la korean problemon. Ni varme amas pacon, ni postulas pacon tra Azio kaj la mondo. Sed ni ne devas forgesi, ke ĝis nun la imperiistaj landoj ankoraŭ ne deziras pacon. Ambaŭ en Azio kaj Eŭropo, Usonaj imperiistoj aktive preparas novan invadan mondmiliton, kaj invadas Koreion kaj nian Tajvanon. Ni devas klopodi forigi la batalpovon de la Popola Liberiga Armeo, firmigi niajn naciajn defendojn kaj lukti por reakiri Tajvanon kaj defendi nian patruon.

"Ni ĉiuj jam akiris rican sperton en politika kaj milita lukto kontraŭ imperiismo kaj interna reakcio. Ni devas daŭre pliriĝi ĉi tiun sperton. Unu fundamenta leciono de ni lernita estas ke ni devas dependi de la forto de la popolo en potenca armita lukto por trakti kun armita invado kaj armita kontraŭrevolucio enlanda. Tiel longe kiel ankoraŭ estos armita invado kaj armita kontraŭrevolucio, niaj popolaj armitaj fortoj ne povos malsarĝigi de sia devo defendi la interesojn de la popolo."

Post Ĉefkomandanto Ĉu Teh parolis Kuo Mo-jo, kiu diris, "La granda venko de la ĉina popola revolucio estas nedisigbla de la malfacilaj luktoj kaj heroaj bataloj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Ĉina Komunista Partio." Li alvokis la popolon plue forigi la Popolan Liberigan Armeon kaj etendi la armilkontribuan kampanjon por firmigi la popolan venkon kaj gardi naciajn sendependecon kaj sekuron.

Inter daŭra aplaŭdo standardoj kaj bukedoj estis prezentataj al Ĉefkomandanto Ĉu Teh de Junaj Pioniroj, infanoj el Pekinaj infanejoj, la Vietnamia Popola Delegacio, laboristoj kaj aliaj. Post la kunveno opero "La Longa Marŝo" estis ludata por la kunvenantoj.

**Celebroj kaj Salutoj de la Popolo**

En Pekino, diverskvartale okazis diversspecaj popolaj kunvenoj dum pluraj tagoj por celebri la Armean Tagon, subteni la Armeon kaj honori la familiojn de la armeanoj. Organizigis grupoj popolamasaj por saluti la familiojn de martiroj kaj armeanoj. Ĉie vidigis salutgrupojn kun antaŭirantaj portantoj de premiaj standardoj, talitambur-ludantoj kaj Junaj Pioniroj. Ili vizitis ĉiujn familiojn de martiroj kaj armeanoj kaj pendigis por ili tabulojn kun la vortoj "Gloraj estas la familioj armeanaj."

Entuziasma subteno de la ĉina laborista klaso por konstrui potencajn kaj modernajn armeon estas garantiata de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj en sia saluttelegramo al la Popola Liberiga Armeo, celebranta la Ĉinan Armean Tagon. La telegramo diras, ke dum la Usonaj imperiistoj ankoraŭ okupas nian teritorion Tajvan, aktive rearman Japanion kaj Okcidentan Germanion, kaj senĉese kreas malfacilaĵojn en la armisticaj interparoloj en Koreio, laboristoj tra la tuta lando faros ĉiujn eblajn penojn en la lukto por la defendo de sia patrio.

En alia telegramo al la ĉinaj popolaj volontuloj, la Tutĉinia Federacio de Laboristoj asertas, ke la ebleco de paca solvo de la korea problemo estas la rezulto de la pezaj bataloj donitaj de la ĉinaj popolaj volontuloj al la feroacaj Usonaj imperiistaj fortoj. Ĝi garantiis la subtenon de la laboristoj per plua disvolvado de sia patriota konkursa kampanjo por produkti pli multajn kaj pli bonajn armilojn kaj varojn, kaj per kontribuo de pli multaj aeroplanoj.

Telegramoj senditaj de la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj al la Popola Liberiga Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj diras, ke virinoj en Ĉinio plene komprenas ke la sekuro kaj feliĉo de la virinoj, patrioj kaj infanoj estas neeblaj sen la venko de la malfacila lukto de la Popola Liberiga Armeo kaj sen la pezaj bataloj

(daŭrigota sur p. 62)



Batalantoj de la Popola Liberiga Armeo

Skulptaĵo de Hua Tian-ĵoŭ

# Ĉefkomandanto Ĉu Teh

En la jaro 1886, Generalo Ĉu Teh (朱德), la Ĉefkomandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, naskiĝis en farmula familio en Ilung-Gubernio (儀隴) de Seĉuan-Provinco (四川省). Sub la subpremado de bienuloj, lia familio vivis tre mizere. Jam en sia 7-8-jara aĝo Ĉefkomandanto Ĉu komencis ellerni terkulturon.

Estante 23-jara en la jaro 1909, Ĉefkomandanto Ĉu jam partoprenis la sekretan revolucionan organizon Tungmenghuj (La Revolucia Ligo gvidita de Sun Jat-sen). Pli poste li fariĝis regimentestro kaj brigadestro en Junnan-a armeo. En la aŭtuno de 1922 li forveturis al Eŭropo kaj je la fino de tiu jaro li aliĝis al la Ĉina Komunista Partio. Ekde tiam li marŝas sur la nova revolucia vojo.

En la jaro 1925, Ĉefkomandanto Ĉu estis arestita de la germana registaro pro sia subteno al la striko de Ŝanhajaj laboristoj; poste li estis elpelita el Germanio. Reveninte al sia patrujo, Ĉefkomandanto Ĉu partoprenis la Norden-Ekspedicion. Li gvidis en Vuĉang (武昌) laboristan sindikaton, kurson por kadroj de kamparana sindikato kaj aliajn kursojn por eleduki revoluciajn kadrojn.

En la jaro 1927, post la perfido de Ĉiang Kaj-ŝek al la revolucio, Ĉefkomandanto Ĉu, k-doĝ Ho Lung (賀龍), Je Ting (葉挺) k.a. ekribelis kontraŭ la perfiduloj je la 1-a de aŭgusto kaj fondis la Ruĝan Armeon de Ĉinaj Laboristoj kaj Kamparanoj. En 1928 Ĉefkomandanto Ĉu renkontiĝis kun Prezidanto Maŭ sur Kingkang-Monto (井崗山). Sub la ĝusta gvidado de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĉu, la Ruĝa Armeo bataladis kontraŭ la "ekstermaj sieĝoj" faritaj de Kuomintanga



armeo, akiris grandajn venkojn kaj konservis la revoluciajn semojn. Pli poste, laŭ la ĝusta strategio de Prezidanto Maŭ, Ĉefkomandanto Ĉu gvidadis la 8-vojan Armeon kaj la Novan 4-an Armeon persisti la rezistadon post la fronto de la japanaj diabloj, fondis kontraŭjapanan bazregionon, ekstermis grandan nombron da malamikoj kaj akiris la finan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Sed poste la bandita kliko de Ĉiang Kaj-ŝek ekbruligis la grand-skalan enlandan militon. Tiam Ĉefkomandanto Ĉu gvidis la Popolan Liberigan Armeon batali kontraŭ la reakcia banditarmeo unue en defensivo kaj poste en ofensivo, ekstermis pli ol ok milionojn da Ĉiang-Kaj-ŝek-aj banditarmeanoj, frakasis la reakcian reĝimon de la Ĉiang-Kaj-ŝeka banditkliko kaj akiris la finan venkon.

Nun Ĉefkomandanto Ĉu Teh estas membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, vicprezidanto de la Centra Popola Registaro de Ĉina Popola Respubliko kaj vicprezidanto de la Popola Revolucia Milita Konsilo.



# Generalo Peng Teh-huaj

kaj tie renkontiĝis kun la ruĝa armeo gvidata de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĉu Teh. Por defendi la revolucion baz-regionon li gvidante siajn trupojn frakasis multfojn atakojn de Ĉiang-Kaj-ŝek-a bandita armeo.

En la jaro 1937, la Ĉina laborista - Komparana Ruĝa Armeo reorganiziĝis en Okavojan Armeon kaj Generalo Peng Teh-huaj fariĝis ĝia vicĉefkomandanto. Dum la Kontraŭ-japana Milito li persistis en la rezistado en la postfronto

de la malamikoj en Nordĉinio kaj per mirinda partizana batalado donis al la malamikoj timigajn atakojn. En la jaro 1947 la bandita armeo de Hu Zung-nan (胡宗南) atakis la Lim-regionon de Ŝensi-Kansu-Ningŝia (陝甘寧邊區). Generalo Peng Teh-huaj komandante kelkoble malpli multe da armeanoj ol la malamiko batalis kun la bandita armeo de Hu Zung-nan. Post ne tre longa tempo, ŝanginte la defensivon en ofensivon li venkis la banditan armeon de Hu Zung-nan kaj liberigis la tutan Nordokcidentan Ĉinion.

Generalo Peng Teh-huaj naskiĝis en 1900 en Siangtan-Gubernio (湘潭縣) de Hunan-Provinco (湖南省) en iu kamparana familio. Li iom lernis en lernejo je sia 9-jara aĝo kaj iom pli poste li forlasis sian hejmlokon por lerni ian metion. Li jam soldatiĝis kiam li estis 16-jara. Generalo Peng Teh-huaj jam en junaĝo partoprenis la kompartion.

En la jaro 1923, post kiam Ĉiang Kai-ŝek perfidis la revolucion, Generalo Peng Teh-huaj gvidis la de li estratan naciajn armeon ribeli en Pinkiang (平江) en Hunan-Provinco kaj kreis la Kvinajn Armeon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. Poste gvidante la armeon li atingis Kingkang-Monton (井崗山)

Post kiam la Usonaj imperiistoj lanĉis la agresan militon al Koreio kaj atakis ĝis la landlimo de Ĉinio, Generalo Peng Teh-huaj gvidis la ĉinajn volontulojn sinjeti al la korea fronto kaj batalas ŝultro-ĉe-ŝultre kun la Korea Popola Armeo kontraŭ la sama malamiko. Dum ok monatoj jam estas ekstermitaj pli ol ducent mil malamikoj kaj pro tio Usono devas akcepti la pacan proponon de Malik kaj komencis konduki interparoladon kun la ĉinaj volontuloj kaj la Korea Popola Armeo.

misfapas malantaŭ ni?... Ja ĉiuj naskiĝis de la patrino, se la malamikoj havas po du piedojn, ja ankaŭ ni havas po du piedojn... K-do Ho Lung (賀龍), kiu partoprenis la revolucion kun du legomtranciloj, nun jam estas armeestro. Nun ni havas ne nur du legomtrancilojn, sed du batalionojn, ĉu ni ankoraŭ dubas pri nia sukceso estonta?... Ĉiuj vi ja partoprenis ribelon, ĉiu el vi egalas al dek malamikoj, kaj dek el vi, al cent. Nun ni havas trupon konsistantan el kelkcent tiaj homoj, kion do ni ankoraŭ timas?... Sen la sperto en malsukceso kaj malvenko oni ja ne povas sukcesi!..."

## Armea Tago.....(daŭrigo)

donitaj al la Usonaj invadantoj de la heroaj ĉinaj popolaj volontuloj.

Salutoj estis senditaj ankaŭ de la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj kaj la Tutĉinia Federacio de Studentoj. La ĉinaj junuloj rigardas kiel la plej grandan honoron esti membro de la Popola Liberiga Armeo, diras la telegramo. Ĝi ankaŭ diras, ke la ĉinaj popolaj volontuloj faris glorajn ekzemplojn por la studentoj kaj junuloj tra la tuta lando.

Esprimante la kredon de la ĉina popolo, la Landa Komitato de la Politika Konsiliga Konferenco de la Ĉina Popolo kaj demokratiaj partioj kaj grupoj de Ĉinio diras je la fino de sia telegramo, "Ni firme kredas ke kun la Popola Liberiga Armeo, la ĉina popolo ĉiam marŝos de venko al venko kaj la sankteco de la teritorio de Ĉinio estos por ĉiam netuŝebla. Hodiaŭ, kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la tendaro de mondopaco kaj demokratio estrata de Sovetio estas pli forta ol iam ajn kaj la afero gardi mondopacon sendube gajnos finan venkon."

## La Reorganizo de la Ruĝa Armeo ĉe Sanvan

En la aŭtuno de 1927, post la malvenko de la aŭtun-rikolta ribelo en Hunan-Provinco, la trupoj de l' Ruĝa Armeo retiriĝis de sur la fronto. Ĉiutage, ni ekmarŝis antaŭ tagiĝo kaj povis kampi por tranokti nur post vesperigo. Trapasinte la lokojn Pingkiang (平江), Liuĵang (瀏陽), Tungku (銅鼓), Pingsiang (萍鄉), kaj atinginte Sanvan-on (三灣) en la regiono de Jungŝin (永新) sudoriente de Lianhua (蓮花) oni komencis reorganizi la trupojn. Tio estis unu el la malfacilaj momentoj en la historio de la Ruĝa Armeo. Depost nia malvenko en la batalado ĉe Ĉangŝoukie (長壽街) la malamikoj de Hunan-Provinco obstine nin persekutadis por nin, ĉiujn ĉi revoluciajn semojn, ekstermi per unu bato. Por ni, ankoraŭ ne spertaj infanoj, estis malfacile elteni tiajn ondojn. Iuj malsaniĝis, aliaj mortis, fariĝis lacegaj aŭ timplenaj, kaj malaltiĝis la batalŝpinto kvazaŭ oni estus venkitaj en kelkdek bataloj.

## Tan Ĉeng (譚政)

La duan tagon, atinginte Sanvan-on, la diviziestro kunvokis la batalantojn kaj ekparolis: "...Nun niaj homoj malmultiĝis, la divizio devas reorganiziĝi en reĝimenton; se por reĝimento ankoraŭ ne ŝufiĉas la trupanoj, oni devas reorganiziĝi en du batalionojn..."

La aŭskultantoj perdis sian aplombecon, en la kunveno ĉiuj senkonsile gapis al la diviziestro ŝagrene. Subite la nova reĝimentestro rekomendis k-don Maŭ Ze-tung alparoli al la trupo.

El la homamaso venis viro altstatura kun hararo delonge netondita, vestita per ĉifona civilula vatita vesto, tamen kun paro da gamaŝoj ĉirkaŭ la kruroj kaj la piedoj vestitaj per paro da pajlaj sandaloj. Li paŝis antaŭ la armeanojn en afabla maniero kaj kun rideto, kaj tiam ĉiuj tuj ekplaŭdis ridetante. Li ekparolis:

"...K-doĝ, ĉu estas io timinda en tio, ke la malamikoj nur sencele

ĉiuj kapjesante ridetis, aspektante tre inspiritaj. Tuj post la fino de la kunveno, ĉiuj komencis vikle interbabilu grupu:

"K-do Maŭ Ze-tung ne timas, kion ni ankoraŭ devas timi?"

"K-do Ho Lung partoprenis la revolucion kun du legomtranciloj, kaj povis prosperi, sed ni, kelkcent batalantoj ne povus prosperi?"

—Elĉinigiŝ Zekun





Vusman kaptita kaj kondamnita al morto

## Vusman Bandito, Murdisto Kaj Usona Spiono

Vusman (烏斯滿) estis tipa produktaĵo de politika krepusko de la reakciularo ĉe la malproksima Nordokcidento de Ĉinio. Li estis bandito, senkompata murdisto kaj Usona agento.

La kaptado kaj ekzekuto de Vusman je la 29a de aprilo signifas al Vaŝingtono perdon de unu el siaj ĉefaj esperoj interveni kontraŭ la rapida demokrata prosperiĝo de la ĉina Sinkiang-Provinco (新疆省) kaj konservi sian lokan spionan retaron kontraŭ la Popola Ĉinio kaj la USSR.

Kontraŭstarate de nerefuteblaj atestaĵoj, Vusman finfine konfesis seriojn da abomenaj krimoj kontraŭ la popolo, faritaj en la plej intima kunlaboro kun kaj sub la ordonoj de la Usonaj ekskonsulo kaj eksvic-konsulo en la regiono, J. Hall Paxton kaj Douglas S. MacKiernan.

Atesto de Vusman jetis lumon sur kelkaj mallumaj punktoj. Eble ni memoras la "Pejtaŝan (北塔山)-Incidenton" de junio, 1947. La Kuomintang kaj imperiista propagando tiam brue klaĉis pri "invado" al Ĉinio el trans la landlimo de la Mongola Popola Respubliko. Nun ni havas la "internan" historion. Vusman atestis:

"MacKiernan organizis mian trupon por kunlabori kun la Kuomintang 5a Kavaleria regimento sub Sung Ŝi-lian (宋希濂) (tiam komandanta la Kuomintangan Sinkiang-Garnizonon), en atako al la MPR trans la landlimoj.

"La unuan tagon ni atakis Halajiti. Sur najbara montpinto MacKiernan laboris super landkarton. La pafadoj el la defendantaj trupoj de MPR tiel ekstimigis lin ke li stumblis mal-supren de la montpinto postlasante la ĉapelon, landkarton kaj lornon. Mi poste sendis iun por ilin reakiri.

"La sekvantan tagon, MacKiernan partoprenis en milita operacio ĉe najbara loko. Li sukcesis fini la landkarton por la Usona registaro."

Sub personaj instrukcioj de MacKiernan, Vusman kaj Sung Ŝi-lian ripetis atakojn al la landlimoj de MPR. Ili estis repelitaj kaj MacKiernan retiriĝis kun la trupoj suden de Pejtaŝan.

Unu jaron poste, en junio, 1948, MacKiernan kaj Sung Ŝi-lian venigis Vusman al Tihua (迪化). Ili jam organizis la tiel nomatan "Revolucian Komitaton" kontraŭ komunismo, Sovetunio kaj la "Tri Distriktoj" (la liberigitaj distriktoj de Ili (伊犁), Taĉeng (塔城), kaj Aŝan (阿山).

en Sinkiang. Vusman estis nomita vicprezidanto de la komitato. MacKiernan ordonis lin kolekti informojn kaj prepari por atako al la "Tri Distriktoj."

En la printempo de 1949, kiam venkoj de la Popola Liberiga Armeo konfuzis ĉi tiujn brutulojn, MacKiernan vojaĝis al Santaj (三台) kelkajn fojojn por instigi Vusman-on pligrandigi siajn trupojn. En aprilo, Hall Paxton diris al li: "Kuomintang estas frakasita. Mi kredas ke vi bone utiligos la helpon kiun ni usonanoj donis al vi por kontraŭstari kontraŭ la komunistoj kaj la "Tri Distriktoj". Paxton ankaŭ instigis lin ke li intime rilatigu kun Jaŭlobos (尧乐博斯) kaj Ĝanimhan (贾尼木汗), du aliaj ategaj banditoj de la loko. Dume Vasili Zvancov, blanka ruso, unu el la ĉefhelpantoj de Vusman jam lernis de MacKiernan ekde februaro, 1949, kiel kontakti kun sia Usona mastro per radio.

Vusman konfesis en sia atesto, "Antaŭ kiam la Popola Liberiga Armeo eniris Sinkiang, mi pri-



Post anonco pri la mortokondamno al Vusman en la publika tribunalo ĉiuj naciajnoj en Sinkiang-Provinco ĝoje krias.

rabis la guberniojn Kital (奇台), Fujuan (孚远), Fukang (阜康), Mulejho (木垒河) kaj Cangli (昌吉) por ke provizajoj kaj mono por postaj ribeloj estu amasigitaj. MacKiernan mem tiam organizis ĉirkaŭ 100 blankajn rusojn por kolekto de informoj pri la USSR kaj la "Tri Distriktoj".

Sinkiang estis liberigita pace en septembro, 1949. MacKiernan, kune kun siaj blankaj rusoj tuj iris al Vusman en la Fujuan-montaro, kie ili havis konferencon kun filo de Ĝanimhan, Zvancov kaj aliaj banditejoj por plani siajn sekvantajn movojn.

MacKiernan, ĉiam plena je intrigoj provis persvadi Vusman iri kun li al Usono. Li diris: "Vi kaj Ĝanim-

## Ŝanĝiĝis Geinstruistoj Kaj Lernantoj

Same kiel ĉio alia en Nova Ĉinio, rilatoj inter geinstruistoj kaj lernantoj transformiĝis dum la mallonga tempo ekde liberigo. Nuntempe, geinstruistoj estas la amikoj de ambaŭ infanoj kaj iliaj gepatroj, kaj intime scias pri ilia hejmvivo.

Sintenoj de geinstruistoj, infanoj kaj gepatroj jam ŝanĝiĝis. Geinstruistoj akceptas respondecon por ĉiu infano kaj certigas ke ĉiu lernanto bone komprenas ĉiun lecionon. Ĉiu infano estas traktata kiel aparta problemo.

Lernantoj ne estas simple nomataj stultaj se ili ne komprenas. Por tiaj lernantoj, la geinstruistoj planas specialan metodon de prezentado kaj gajnas la konfidon de la infanoj per pacenca klarigo.

Al pli brilaj lernantoj oni rekomendas referencajn librojn kaj legaĵojn ekster la lecionaro, por ke ili ne estu malhelpata de la malpli progresantaj.

En tipa okazo, lernantino trovis malfacilajn sekvi la lecionojn. La instruisto, tiel, vizitis sian familion, kaj eksciis ke ŝi elspezis tro multe da tempo helpi en la dommastrumado kaj flegi sian invalidan patrinon. La instruisto tial aranĝis pasigi kun ŝi tempon post la lerneja horo kaj klarigi al ŝi la lecionojn.

Nepaciencon pri petolemaj infanoj nun la geinstruistoj rigardas kiel tre malutilan kaj ĉiu klopodo estas farata por gvidi ilian energion en gustan fluejon.

Ekde liberigo, multaj paroladoj pri naciaj minoritatoj jam ŝanĝis la sintenon de la infanoj. Ekzemple, Mongolia infano kiu ne entuziasmis pri sia studo ĉar li estis malrespektita de la aliaj infanoj, nun gajnis la unuan premion en verkaĵo-konkurso de infana gazeto en Pekino. Tie, kie malriĉeco, ĉe la hejmo influas al la studo de la infanoj, la geinstruistoj esploras pri la cirkonstanco kaj provas helpi.

En lernejo kiun la verkinto vizitis dum tagmeza ripozo, kvar ĝis kvin geinstruistoj iris ĉirkaŭe por kontroli, ke ĉiu infano havu propran ripozon.

Ekde liberigo, infanoj de laboristoj kaj kamparanoj jam povas eniri elementajn lernejojn. Elementa edukado ne plu restas rajto de riĉaj infanoj.

Lernantoj en nova Ĉinio estas nun aktivaj en ĉiuj manieroj. En Pekino kaj aliaj urboj, apartaj radio-programoj estas disaŭditaj por infanoj kiuj partoprenas kaj aŭskulta. Diskutoj pri kurantaj aferoj en lernejoj kaj el la radio helpas altigon de varma amo por Ĉinio kaj internaciismo.

Korbopilko kaj basbalo, gimnastiko, ŝako, pentrado, kostumkudro, ekskursoj al vilaĝoj kaj botanikaj provizas ĉiufankan edukon.

Mezmatenaj manĝetoj kaj manĝoj estas bonegaj kaj higieno estas atente observata. Infanoj ricevas regulajn fizikajn ekzamenojn kaj injektojn.

Plejparte de la lernejoj nun plivastigas, aldonante novajn konstruaĵojn kaj novan ekipon. Ĉe ili estas bonaj bibliotekoj kaj novaj libroj estas aĉetitaj ĉiumonate.

La kvin-jara sistemo estas nun la praktiko en multaj lernejoj, kaj baldaŭ farigos generala. Geinstruistoj de specialaj lecionoj kiel ĉinlingvo, matematiko, muziko k.t.p. sekvas la lernantojn tra la kvin jaroj, por ke ili povu pli efike daŭrigi la edukon per pli profunda kompreno pri la lernantoj.

Brilaj perspektivoj en nova Ĉinio kuraĝigas la lernantojn al entuziasma studo. Ili aspiras fariĝi sciencistoj, inĝenieroj, doktoroj, verkistoj, muzikistoj — esti kapablaj kaj bonegaj laboristoj.

—C. S.

kiam "la tria mondmilito eksplodos".

"Post kelkaj tagoj," diris Vusman, "MacKiernan transdonis siajn blank-rusajn trupojn al mi. Li promesis konstantajn provizaĵojn el Usono."

Post la forlaso de MacKiernan, Vusman plenumis armitajn banditajn atakojn kunlaborante kun Ĝanimhan kaj Jaŭlobos kontraŭ la popolo.

Dum serioj da savogoj bandit-atakoj, li kaj liaj sekvantoj mortigis pli ol 1,175 homojn de diversaj naci-minoritatoj en Sinkiang kaj buĉis la anojn de ne malpli ol 319 hazakaj familioj. Unu hazaka virino preparolis kiel la banditoj de Vusman for-rabis tutan sian bestaron kaj finis sian orgion per disŝiro de la adomeno de ŝia graveda fratino.

Vusman estis kaptita de la Popola Liberiga Armeo je la 19a de februaro ĉe Hajze (海子), norde de la Caidam-Baseno (柴达木) en Ĉinghaj-Provinco. Lia tuta historio estis malkovrita en publika juĝado en Tihua, ĉe kiu ĉeestis 80,000 homoj el multaj partoj de Sinkiang. Dekmil popolaroj vidis la ekzekuton de tiu ĉi malamita amasmurdisto, kaj la finon de plua ĉapitro en la sangplena malhonora historio de Usona spionado kaj sabotaĵo kontraŭ la ĉina popolo.

—Censino

\* problemo de minoritato, kreita de imperismo por trompi la minoritaton sub sian regadon.

# La Junaj Pioniroj de Nova Ĉinio

Li Ĉin (李今)

En sia decido pri fondo de Ĉina Nov-demokratia Junula Ligo, anoncita en januaro 1949, la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio emfazis ke la ligo devas elekti plej bonajn kadrojn por gvidi la laboron pri geknaboj. En oktobro de la sama jaro la Centra Komitato de la Junula Ligo decidis starigi Ĉinan Junpioniran Korpuson kaj en aprilo de 1950 la dirita Komitato publikigis la korpusan standardon, kanton, insignon kaj sloganojn. De tiam la ruĝa koltuko kiu reprezentas angulon de nia ruĝa standardo fariĝis la simbolo de honoro por niaj geknaboj. Tra la tuta lando laŭte disaŭdiĝas la korpusa slogano: "Estu preta, estu ĉiam preta por konstrui nian landon kaj realigi la grandan ideon de Prezidanto Maŭ".

La aĝoj de la pioniroj varias de 9 ĝis 15. Laŭ nekompleta statistiko farita en decembro lastjare sintrovas en la tuta lando jam 1,940,000 pioniroj.

Por la gvidado de la laboro por geknaboj, en la diversgradaj komitatoj de la Junula Ligo estas starigita Sekcio por Geknaboj. Ankaŭ la instruistoj de multaj lernejoj subtenas kaj helpas la laboron de la Korpuso. La komitatoj ankaŭ invitas entuziasmajn instruistojn kiel direktantojn por direkti la agadojn de la pioniroj sub la gvidado de la Sekcio por Geknaboj.

Post pli ol unu jaro depost sia fondigo la Korpuso jam akiras brilan sukceson en la kampo de kulturo kaj eduko. Pere de la propraj organizoj kaj kolektivaj agadoj de la geknaboj ĝi pliriĉigis la scion de la geknaboj, bone edukis ilian spiriton kaj pliperfektigis ilian sanstaton.

Rilate al la kultura edukado, ĝi vekis la intereson de la geknaboj pri lernado kaj disvolvis iliajn specialajn kapablojn kaj inventemon. Laŭ malsamaj interesoj la Korpuso organizis diversajn stud-rondetojn de specimenoj, geografi-modeloj, kemio, fiziko kaj literaturo. Ĝi aranĝis vizitojn al fabrikoj, stalfarmoj, astronomia kaj meteorologia observatorioj kaj elpensis lern-ludojn kiel "rapida trovo" de eraraj aŭ malĝustaj vortoj, kunmetado de dispecigita mapo kaj ludado de interpunkcia ŝako. Ĝi okazigis diversajn kunsidojn, ekz., rakont-kunsido kaj scienca vespero kaj ekspoziciojn de modeloj de glitaeroplanoj kaj malgrandaj motoroj. Per tiuj ĉi metodoj ĝi helpis la geknabojn kompreni pli klare siajn lecionojn kaj samtempe pliriĉigis iliajn sciojn.

Rilate al la politika konscio, la Korpuso faris edukon patriotisman kaj internacian.



La pioniroj partoprenis aktive en la kontraŭ-usona por-korea movado en la porpaca subskribado kaj okazigis multajn kunvenojn por rakontoj pri



Unu el la taĉmentestroj de la pioniroj en Pekino.

volontulaj heroaj bataloj kaj rakontoj pri krimagoj de Usona armeo. Ili vizitis muzeojn pri martiroj, rendezuis kun batal-kaj labor-heroaj kaj invitis membrojn de Popola Liberiga Armeo al interamikiga kunvenoj. Ili kolektive rigardis filmojn havantajn eduksignifon kaj faris vizitojn al verkistoj kaj kleruloj. Pere de ĉio tio ili akiris praktikan edukon pri patriotismo kaj internaciismo.

Ili plej ŝatas la Korpusan Tagon. Dum la tago "Patrolando, mi amas vin" ili deklamis poemojn kiuj prikantante la patrolandon, rakontis pri la rezistado fare de geknaboj kontraŭ japanaj imperiistoj kaj pri la subpremado fare de Ĉiang-Kaj-ŝekaj armeoj al la popolo kaj kantis pri la heroajoj de la liberigaj armeoj, tiel esprimante la grandiozon kaj la triumfon de la revolucio. Dum la tago "Liberigu Koreion" ili ludis batal-ludon en kiu la Ĉinaj Popolaj Volontuloj batalas ŝultro-ĉe-ŝultre kun la Korea Popola Armeo kaj fine triumfe renkontiĝas kaj kune okazigas celebran kunvenon tiel klarigante la nebran sukceson de la kontraŭ-usona kaj por-korea movado.

Rilate al la edukado pri la ideo de laborado kaj kolektivismo la Korpuso organizis geknabojn por vizitado al fabrikoj kaj vilaĝoj, intimigante ilin kun labristoj kaj kamparanoj. La geknaboj ankaŭ sin okupis pri tiaj praktikaj laboroj kiel reordigi lernejan ĝardenon kaj helpi kamparanojn rikolti. Al ili estis rakontata la kreado de la mondo per laborado por ke ili estimu la laboradon kaj al ĝi kutimiĝu.

Jam pli ol unu jaron la pioniroj ricevas edukon pri ĝenerala scio kaj politika konscio. La rezulto reflektiĝas en la kreskado de novaj ideoj meze de la geknaboj kaj tiuj novaj ideoj montras sin en ilia

Kun pinkovritaj montetoj kaj murmurantaj riveretoj la malproksima regiono de la Tienmu-Monto (天目山), sude de Hangĉou (杭州) estis delonge loko de pitoreska pejzaĝo por turistoj. Sed nun la turistoj trovas ĉe ambaŭ flankoj de la vojoj tra la regiono ankaŭ la ĉie troviĝantajn signo-tabuletojn kun surskribajo: "Tiu ĉi kampo nun apartenas al kamparano Huang (aŭ Ĉang)". Agrara reformo, kiu trakuras la grandan agrikulturan zonan sude de la Flava Rivero, enpenetras ankaŭ en tiun ĉi malproksiman regionon.

La granda ŝango en la Tienmu-regiono estas evidenta ĉe ĉiu angulo. Sur la vojoj kaj stratetoj paŝas ne plu duonmalsataj kaj ĉifonvestitaj kamparanoj. Anstataŭe oni ĉie renkontas feliĉajn kaj okupatajn virojn kaj virinojn. Multe da kamparanaj familioj transloĝiĝis el siaj pajllegmentaj kabanetoj en la belajn konstruaĵojn transprenitajn de la bienuloj.

Antaŭ malpli ol unu jaro tiu ĉi famkonata turisma regiono entenanta dekduon da gubernioj kaj kun pli ol

miliono da loĝantoj estis la privata posedaĵo de kelkaj bienuloj, kiuj posedis grandan parton de arbarejo, plantejo de teo kaj de bambuo. Unu el la grandaj bienoj ampleksis eĉ tutan gubernion, t.e. proksimume 1,400 kvadrataj kilometroj.

Malantaŭ la bienuloj staris la Ĉiang-Kaj-ŝeka registaro. Ili ĉiuj estis plen-potencaj; iliaj vortoj estis leĝo. La loka administrado estis en iliaj propraj manoj, kaj ili povis fari ĉion laŭvole, kaj eĉ povis mortigi iun ajn kamparanojn. Multaj el ili loĝis en imponaj konstruaĵoj, apud kiuj la kabanetoj de loĝantoj ŝajnis liliputaj. Ili havis bandojn de armitaj lakeoj ekipitaj per pafiloj kaj maŝinpafiloj. Ne estis mirindaĵo ke la lokaj kamparanoj nomis tiujn ĉi senkompatajn posedantojn de tero kaj arbaro "bien-tigro" aŭ "arbar-tigro".

La agrara reformo, kiu komencis ĉi-tie lastan aŭtunon, detronis la "tigrojn" kaj forbatis iliajn dentojn. La kamparanoj transprenis la teron. Iliaj elektitaj gvidantoj estas nun stabo de la lokaj administraj, dume

ĉiutaga vivo. La disciplino kaj ordo en la lernejoj plibonigas kaj la solidareco, amikeco kaj interhelpado inter la geknaboj pli fortiĝas. Ili ankaŭ fariĝas pli fervoraj kaj scivolemaj pri sia studado kaj la studrekordoj montras ĝeneralan plialtiĝon. Multaj geknaboj decidis ke ili sekvu Prezidanton Maŭ kiel ekzemplon de fideleco al sia patrolando kaj dumviva servemo al sia popolo. Ili decidis ke ili fariĝu estonte mar-ter- aŭ aer-batalantoj, inĝenieroj, traktoristoj, literaturistoj, sciencistoj, kuracistoj, ktp. por konstrui sian landon.

Rezulte de edukado pri patriotismo kaj internaciismo en vigla kaj viveca maniero, la geknaboj faris multajn korusajn agojn kiuj esperimas ilian amon al la patrolando, malamon kontraŭ la Usonaj imperiistoj kaj simpatian al la batalo de justeco fare de la korea popolo. Dum la kontraŭ-usona kaj por-korea movado ili jam skribis multegajn salut-leterojn kaj faris multegajn donacosaketojn. En Pekino la pioniroj de Jujing-Mezlernejo (育英中學) iniciatis inter la kunlernantoj monŝpanan movadon kaj kolektis pli ol milionon da juanoj por aĉeti tommy-pafilon kaj ĝin oferis al ĝeneralo Kim Il-sung, petante ke li transdonu ĝin al la plej heroa batalanto de Koreio. La geknaboj de la 5a-jara klaso de la Unua Eksperimenta Lernejo de la Hopeja Instruista Lernejo donacis al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ruĝan flagon kaj taglibron. Sur la ruĝa flago estas skribita: "Starigu la flagon sur la tero en Fuŝan!" Sur la unua paĝo de la taglibro estas skribita: "Permesu nin pretigi taglibron por la ruĝa flago por ke vi povu enskribi



La pioniroj en la parado por defendi mondpacon.

ĉion kion la ruĝa flago travivos sur la batalokampo. Onklo volontulo, bonvole komencu de la dua paĝo kaj daŭrigu vian heroon rakonton ĝis la paĝo de fina venko. Post la triumfo kiam vi estos reveninta hejmen montru al ni la taglibron, ke ni legu pri via heroa batalo en Koreio." Nun la ruĝa flago kaj taglibro estas jam prezentitaj al la volontuloj pere de la pioniraj anoj de Ĉina Delegitaro al Koreio.

Ĉio ĉi-tio montras ke sub la sunlumo de Prezidanto Maŭ Ze-tung tre bone kreskas la geknaboj de Nova Ĉinio. Ilia amo al la patrolando ne nur montriĝas en iliaj pensoj sed ankaŭ en iliaj agoj.

En la lasta Maja Tago, kiam la pioniroj en Pekino estis revuitaj de Prezidanto Maŭ antaŭ la Ĉiel-Paca Pordego ili ricevis de li la instruon "sinekzeru por sana korpo kaj lernu diligente". Reprezentante ĉiujn geknabojn de la tuta lando, pli ol 18,000 pioniroj faris al li varmegan respondon alte levante freŝajn florojn, librojn, pilkojn kaj kolombojn.

"Estu preta, estu ĉiam preta por konstrui nian landon kaj realigi la grandan ideon de Prezidanto Maŭ." La geknaboj de Nova Ĉinio jam decidis kaj certe kapablos surŝultri kaj plenumi tiun grandan laboron.

—trad. I. K.



# tigroj" Detronigis

miloj da liberigitaj malriĉaj kamparanoj, mezaj kamparanoj kaj aliaj laborantaj popolanoj jam aliĝis al la milico aŭ al la kamparanaj asocioj. Armitaj per la armiloj de prenitaj de la feŭdaj lakeoj, la milico nun gardas la interesojn de ĉiuj laboruloj. Ribelaj bienuloj estas ĵugitaj en la nove fonditaj popolaj tribunaloj. Jam pasinta estas la despotia feŭda regado. Ĝin anstataŭis la popol-demokratia diktatoreco.

Antaŭe miloj da kamparanaj familioj estis forpelitaj de la bienuloj el la valoj kaj logis alte sur la deklivoj de la montoj. Ili konstruis pajlgmentajn kabanetojn kiel hejmojn, kaj provis elpremi vivrimedon el malgrandaj strioj da neproduktiva tero kiun ili kulturis sur la krutaj montflankoj. Tamen, je la tempo de rikolto la armitaj lakeoj de bienuloj venis kaj forprenis 60 ĝis 70 procentojn de ilia rikolto. La tero elerpiĝis ĉirkaŭ tri jarojn, kaj la farmuloj devis ree translokiĝi al aliaj deklivoj. La agrara reformo finis ankaŭ tiun ĉi mizeran vivon de migrado. Multaj el la farmuloj

nun translokiĝis al la valoj kaj konstruis sur la tero, kiun ili akiris, siajn hejmojn laŭ la vera senco de tiu vorto.

Dek ok tiaj novaj domoj konstruiĝis en la vilaĝo "Salik-Ponto" (柳橋) en Juhang-Gubernio (餘杭縣) kaj cent vagantaj kamparanoj jam ekloĝis tie. Pluaj domoj estas konstruataj.

Unu el la loĝantoj diris al mi: "Jam pli ol 40 jarojn mi estis translokiĝanta de unu monto al alia kiel soleca birdo sennesta. Hodiaŭ mi havas mian propran hejmon kaj ankaŭ rizkampojn kaj bambuejojn.

Alia feliĉa homo estas Tung Ĉing-li (董慶立). Kiam li kondukis min en sian domon, li montris al mi kun ĝojbriloj en la okuloj, "Tiu ĉi ĉambro estas kuirejo; tiu estas gastĉambro, kaj la alia, dormo-ĉambro." Hejmo-havanta vivo komenciĝas por tiu ĉi "ruliĝanta ŝtono" (t.e. vaganto), kiu estas projektanta edziĝon por la unua fojo je aĝo de pli ol 50 jaroj.

Aŭdinte ke ĵurnalisto el Pekino alvenis, griz-hara kamparano en

Vuĉian-Gubernio (於潛縣) nomita Jang Li-pai (楊立培) veturis multe da kilometroj por renkonti min. Li kunportis kun si malnovan pecon da flava tuko, kiun li petis min prezenti por li al Prezidanto Maŭ Ze-tung.

Tiu ĉi peco de tineomordita tuko, kiun li nomis "flava akuzoskribo" havas interesan historion. Antaŭ pli ol du jardekoj la hejmo de la maljunulo estis forbruligita de la bienulo Vu (吳), kaj liaj edzino kaj tri infanoj estis mortigitaj. Li akuzis ce la loka juĝejo, sed lia akuzo ne estis akceptita. Li poste ekveturis al Hangĉou, la ĉefurbo de la provinco sed ankaŭ tie lia akuzo ne estis akceptita. Kaj poste li veturis al Nankino, la ĉefurbo de Ĉiang-Kaj-ŝek-a reĝimo. Tiun ĉi fojon li skribis sian akuzon kontraŭ la bienulo sur peco da flava tuko. Kun ĝi ligita sur sia dorso, li iris antaŭ la Plej Superan Juĝejon de Kuomintang. Ĝed li estis forpelita de la gardistoj.

Kamparano Jang ne plu bezonas sian "flavan akuzoskribon". La bi-



Post la agrara reformo la kamparano ĝoje portas signotabulon por ĝin starigi ĉe sia kampo.

enuloj de la Tienmu-regiono estis jam detronitaj, kaj la malbonuloj estis ĵugitaj kaj punitaj. Li esperas ke la flava tuko estos ekspoziciata en la Pekina Muzeo kiel atestaĵo de la subpremo kaj mizero, kiujn la agrara reformo finis por ĉina kamparana amaso.

Ĉen

\* La plej familiaraj familinomoj de ĉinoj.

## Lu Ŝeng (魯生) Kan Caj-hua Heroino en Subjugado de la Huaj-Rivero

Laŭ la mil-lia\* bordo de la Huaj-Rivero nun laboras energie pli ol duonmiliono da junaj kaj mezaĝaj virinoj por la subjugado de la rivero tute kiel la viraj laborantoj.

Sur granda digo de Huaj-Rivero en regiono Eta Pang-pu (小蚌埠) mi vidis dek ok virinojn kure transporti terojn al la digo. Ĉirkaŭ iliaj kapoj estis blankaj tukoj kun desegno de

"Venu, kamaradinoj, ni ankoraŭfojon transportu "patriotan terojn" el la "fosajo kontraŭ-Usona kaj por-Koreia"!". Kaj sekve la dekok virinoj ĉiuj eniris en la fosajon kaj enmetis pli da terojn en la korbojn kaj kuras pli rapide sur la digon. Kelkaj pli junaj virinoj pli frue plenuminte tiun alvokon eĉ rekuris por la dua fojo. Fine ili ĉiuj transportis plian fojon antaŭ ol ili ekmanĝis en laborista budo.

Tagmeze, mi intervjuis ilin kaj eksciis ke la altstatura virino estas Kan Caj-hua (甘彩華), special-grada labormodelo en la subjugado de la Huaj-Rivero ĉe la sekcio de Pang-pu (蚌埠). Ŝi invitis min en la laboristan budon kaj mi ekdemandis ŝin kial ili du pliajn fojojn transportis terojn ekster la labortempo. Montrante al mi pelveton da rizajo en sia mano kaj veston sur sia korpo ŝi respondis:

"Rigardu, kamarado! La registaro liveras al ni rizon kaj la fratoj tra la tuta lando provizas nin per vestaĵoj. Ĉu ni indas esti ĉinoj, se ni ne oferas nian forton al la patrolando?" Ili montris al mi siajn lernokajerojn. Mi atente ilin foliumis kaj vidis ke en ĉies lernokajeroj estis nelerte skribitaj ideografoj: "Rezistu Usonon kaj helpu Koreion, defendu niajn hejmojn kaj mastrolandon. Sen mastrolando ne eblas subjugi Huaj-Riveron, batalu por subjugado de Huaj-Rivero por la feliĉo de venontaj generacioj kaj por la prospero de la lando..." kaj tiel plu. Anstataŭ la vorton "patrolando" ili misskribis "mastrolando". Kan Caj-hua tion klarigis "Mastrolando estas lando, kie mastras la popolanoj. Antaŭe, kiam Ĉiang Kaj-ŝek, kanajloj kaj bienuloj mastris, ni popolanoj ja ege suferis." Formetinte la pelvetojn ili ekrememoris pri la vivo pasinta. Kan Caj-hua diris: "Tiam en nia vilaĝo Badazi (八大集) loĝis okdek familioj, sed krom dekkelkaj familioj de bienuloj, centfamiliestroj kaj dekfamiliestroj ĉiujare la ceteraj

devis vagi aliloken almozopetante por eviti malsaton." Montrante la ceterajn virinojn unu post la alia en la budo ŝi diris: Rigardu, kamarado, ŝi plenkreskis sur la dorso de sia patrino; ŝi plenkreskis en ŝarĝkorbo; ŝi plenkreskis sur unurada ŝarĝĉaro; ŝi fariĝis infan-novedzino en sia 13a jaro, kaj ŝi en sia 10a jaro. Se la infan-novedzino estis en hejmo de malriĉulo, ŝi ankoraŭ povis vivi same kiel la aliaj familianoj; sed se ŝi estis en hejmo de kanajlo-bienulo, ŝi do devis suferi multon nedireblan." Laŭ ilia diro la reguloj kiujn formis la kanajlo-bienuloj por infan-novedzinoj estis:

Eĉ se insultata vin retenu de la ploro:

Kaj neniam ridu dum interparolo!  
Por laboroj kuru kuru kiel raketoj!  
Sed volvitaj preme estu la piedoj!  
Respondpreta ĉiam al la bopatrino!  
Kaj la voĉoj sonu kun milda esprimo!

Ĉiujn laborojn, aranĝu bonorde!  
Unu regulo plie: manĝu malmulte!

Rememorante pri ĉi tio la virinoj ekploris. Tiam Kan Caj-hua kvazaŭ ekmemoris ion tre gravan atentigis la aliajn forviŝante la larmojn: "Kamaradinoj, kial vi ankoraŭ ne rapidas nutri la infanojn? — baldaŭ komenciĝos la tempo por labori." El tio mi eksciigis ke duono el ili venis labori kunportante infanojn. Kan

Caj-hua daŭrigis: "Nur nun, post la liberigo, post la alveno de Prezidanto Maŭ, post kiam la popolanoj farigis mastroj de la lando, niaj suferoj povas esti finitaj. Ekzemple pri vartado de infanoj, estinte ni devis ilin porti surdorse tuj post la naskigo kaj ĉien vagi almozopetante, sed nun, kiam ni partoprenas la laboron ĉe la digo, la registaro tuj aranĝis por ni provizoran infanvartejon. La infanoj nun povas ludi en la infanvartejo kaj ne plu necesas kreski sur dorso de la patrino. Nun dumtage ni intras la infanojn du fojojn dum libertempo kaj nokte ni povas dormi karesante ilian korpeton. Kvankam ni sentas nin iom laca, sed ni ja estas tre ĝojaj, ĉar ni ĉiuj bone scias ke la subjugado de la Huaj-Rivero estas por la feliĉo de la venontaj generacioj kaj por la prospero de la lando; kaj ankaŭ la vartado de infanoj estas por eduki la estontajn mastrojn de la lando, kaj tio samtempe estas por ni mem."

Poste ŝi rakontis al mi rezultatojn de la laboroj pri Huaj-Rivero en lasta vintro kaj en la ĉi-jara printempo. Lastvintre ili fosis terojn 300 metrojn for de la digoj kaj ĝin transportis al la digo. La taga rekordo estis 4.7 kubmetroj da teraĵo mezkvante por ĉiu el ili. Tio estis la plej alta rekordo el la virinaj laborantoj kaj pro tio la Komitato por Subjugado de Huaj-Rivero (治淮委员会) premiiis ilin per ruga flago kun vortoj "Herooj el la Virinoj." En la printempo ĉi-jara ili fosis kaj transportis terojn je distanco de 400 metroj, kaj ilia rekordo atingis 4.72 kubmetrojn da teraĵo por ĉiu persono. Krome ili ĉiuj ankoraŭ elfosis kaj transportis 3 kubmetrojn da teraĵo por esprimi sian subtenon al korea fronto, ili diris: "Se ne estus volontuloj, kiuj batalas en Koreio, ni do ne povus subjugadi Huaj-Riveron kaj des pli ne povus trankvile nutri niajn infanojn."

trad K. Ĉing

\* li = 1/2 kilometro

‡ pere de ili la reakcia registaro regis la loĝantojn.



Kan Caj-hua (dekstre) kun sia kunlaborantino.

rugaj floroj kaj verdaj folioj. La malsupraj partoj de iliaj pantolonoj estis volvitaj superen super la genuoj. De tagiĝo ĝis tagmezo ili ripozis nur unu-fojon, kaj eĉ dum tiu, ripozo ili elernis ankaŭ po du novajn ideografojn. Tagmeze, post kiam la estro de ilia laborteamo fajfis por ripozo, ili ankoraŭ ne volis tuj ĉesigi laboron. Mansignant al la ceteraj iu altstatura virino vokis:



Dum ripozado la kamparanoj-laboristoj aŭskultas la ĵurnal-legadon de sia kunlaboranto.

Agnes Smedley

# Epizodo el la Longa Marŝo



Kiam ne vidigis luno, kaj se la malamikoj estis ne proksime, ni ĉiam uzis torĉojn dum la marŝado. Posttagmeze, post kiam iu jam endormiĝis, ni preparis por alia nokto de marŝado. Ĉirkaŭ nia kampejo ni povis ordinarie trovi sekajn bambuojn, kiuj povis esti uzataj kiel torĉoj. Nia tekniko en torĉfarado pliboniĝis ĉiutage. Kelkaj el niaj batalantoj kutime detranĉis pecojn de grandaj bambuoj, forbatis la segmentojn escepte de tiu ĉe la fino, kaj poste plenigis la internon per petrolo aŭ oleo. Tiu speco de torĉo brulis longe. Kelkiuj uzis pinbrandojn, kiuj estis riĉaj je rezino, sed tiaj torĉoj brulis pli rapide ol bambuoj kaj estis pli malfacile troveblaj. La plej bona metodo estis uzi tri maldikajn bambubastonon, ilin kunligi segmenton post segmento, kaj poste difendi la finojn en splitaron. Tiaj torĉoj brulis malrapide kaj donis bonan lumon, kaj la vento ilin ne estingis.

Marŝado kun torĉoj en nokto estas grandioza spektaklo. Kiam ni iris laŭlonge de valo ni povis rigardi ŝupren al la monto barbariĉa kaj vidi mejlojn da flamantaj torĉoj serpentumantaj supren, jen aperantaj kaj jen malaperantaj, kaj flagrantaj tra la nokto. Ili vidigis kvazaŭ longa tordiganta serpento el fajro trapasanta montkavernojn. Super la tuta linio de niaj marŝvicoj vidigis roza brilego.

Kiam ni mem atingis la montpinton ni povis rigardi malsupren al niaj antaŭaj trupoj for malsupre, al la kolono de marŝantoj malsupren-movigantaj, trans valojn kaj sur aliajn montojn kiel ĵajro-drako kun oraj skvamoj brilanta kaj dancanta en longaj serpentumaj volvoj. Ni povis vidi dekojn da miloj da torĉumoj ĉiam movigantaj antaŭen, ondon post ondo, kolonon post kolono.

Sed nokta marŝado estis kelkfoje amara spertajo. Kiam la mallarĝaj montvojoj estis malfacilaj, ni ofte faris unu paŝon antaŭen kaj haltis por dek dum la antaŭaj trupoj penis trovi la vojon. Tio estis tre teda kaj ĉagrena. Kelkfoje ni povis iri nur kelkajn li-ojn. Ni povis nek movigi antaŭen kiel ni volis, nek sidiĝi por ripozi. Iri kelkajn paŝojn kaj poste halti por kelkaj minutoj estis multe pli lacia ol konstanta marŝado. Kiam ni haltis kaj atendis, iuj el niaj batalantoj endormiĝis dum ili staradis. Alia amara spertajo estis marŝi nokte tra ŝtormo, kun la pluvo verŝiganta kaj forta vento vipanta niajn korpajn.

Ni alkitimigis al nokta marŝado kaj pliboniĝis niajn metodojn. Por ebligi al la sekvanto nin vidi ni kutimis fiksi blankan tolon aŭ nian vizagtuon sur niajn pakajcjin kaj,

Je la 16a de oktobro, 1934, la Centra Ruĝa Armeo de pli ol 100.000 batalantoj komencis sian historian Longan Marŝon de la origina Sovet-regiono en Kiangsi-Provinco (江西省) al Norda Ŝensi (陝北) por konstrui novan revolucion bazregionon kontraŭ la japanaj invadantoj. En unu nura jaro ili marŝis 25.000 li-ojn—12.500 kilometrojn—tra 11 provincoj, frakasinte 411 Kuomintangajn regimentojn survoje.

La 25.000-li-a Longa Marŝo, faro senprecedenca en milita historio, estis ege miriga demonstracio de la nevenkebla kuraĝo de la ĉina popolo gvidata de la Ĉina Komunista Partio. En la historio de la ĉina revolucio, ĝi estis unu el la decidaj militagadoj, fondinta la bazregionon, el kiu la popolo estis mobilizita por entrepreni la Kontraŭjapanan Militon kaj finfine akiri la landskalan venkon super la Kuomintanga kliko kaj ĝiaj imperiistaj subtenantoj.

En la sekvanta epizodo, la transiro de Lauŝan (老山) en Kiangsi-Provinco estas priskribita de iu veterano de la Longa Marŝo. Ĝi estas rerakontita de la forpasinta Agnes Smedley kaj eltirita el ŝiaj postlasitaj verkoj, nun en la posedo de la Tutĉinia Federacio de Verkistoj kaj Artistoj.

kun la kroma helpo de bastonoj, ni povis marŝi bone.

Kiam ni estis tre proksimaj al malamikaj pozicioj aŭ trapasantaj blokadajn liniojn de malamiko ni faris nenian bruon kaj vidigis nenian lumigajon. Ĉiuj babilo, fumado aŭ uzo de torĉoj estis malpermesataj. Sed kiam la malamikaj linioj estis fore kaj kiam estis lunlumo kaj milda vento, kaj kiam la vojo estis sufiĉe larĝa por ebligi al ni marŝi ŝultron ĉe ŝultro, estis ĝojige marŝadi en nokto. Kelkfoje tutaj kompanioj ekkantis. Iliaj voĉoj atingis la nubojn, kaj kiam ili finis, alia kompanio ilin sekvis. La orienta ĉielo ofte heligis antaŭ ol ni tien ekrimarkis.

Por igi la marŝadon malpli teda, grupo da homoj en la Centra Politika Buroo formis la de ili nomatan "Fanfaronista Korporacio", dum nombro da aliaj fondis "Societon de Pied-iraj Spertuloj". La "Pied-iraj Spertuloj" elkreis ŝvelrakontojn pri siaj pasintaj grandaj faroj en marŝado, dume kelkaj rakontis pri marŝoj pasintaj kaj nuntempaj, piediroj longaj kaj mallongaj, marŝoj supren kaj malsupren. La membroj de la "Fanfaronista Korporacio", al kiu mi apartenis, sin prifanfonis tiel grandaj, ke aliaj nin nomis "Ŝvelparolista Societo". Tiamaniere ni forgesis nian lacegon kaj ne plu deziris, ke ni havu ĉevalojn por rajdi.

Poste, en la Granda Negmontaro kiam ni havis nenion krom maizo por manĝi kaj ofte tro malmulte da tio, ni ankaŭ formis novajn grupojn kia "Manĝista Societo", regalante unu la alian per fabeloj da belaj manĝaĵoj, kiajn ni havas en la grandaj urboj. Ni ŝvelparoladis.

Ni oferis unu al la alia bonegajn delikataĵojn, dirante kiel ni ilin kuiris kaj kiom da tempo tio bezonis, kaj tiam niaj kamaradoj delikate prenis grainon da maizo el nia mano, ĝin manĝis malrapide

kaj kritikeme kaj plendis pri la spicado.

Vestite en malpuraj, ĉifonaj uniformoj kaj tiel malgrasaj kiel fantomoj, ni kutimis pririgardi la sovaĝan maron de montoj de eterna neĝo kaj oferi unu al la alia teleron da glaciaĵo, ridante bonhumore je niaj serĉoj. Sed tio helpis tenadi nian spiriton.

Lauŝan (Maljuna Monto), leviganta antaŭ ni, estis 30-li-ojn alta de bazo ĝis supro.

Grimpante malrapide, ni preterpasis kabanon de unu el la Jaŭ-triboj, sed kiam tiuj homoj vidis niajn trupojn alproksimiĝantaj ili forkuris kaj nur la patrino de la familio postrestis. Iu kamarado kaj mi eniris kaj komencis interparoli kun ŝi. Ŝi silente aŭskultis dum longa tempo antaŭ ol diri ke ŝi komprenas ĉion kion ni diris. Ŝi komencis rakonti al ni pri la malfacila vivo kaj suferoj de sia familio. Ŝi malmis precipe la militaristojn de Kuangsi-Provinco (廣西省) dirante ke ŝia familio posedis malgrandan pecon da tero en

la valo sed ili estis forpelitaj en la montaron de la militaristoj de Kuangsi-Provinco. Post kiam ni diris al ŝi niajn ideojn, ŝi komencis plori, dirante: "Se via Ruĝa Armeo estus veninta pli frue ni ne estus suferintaj tiel multe."

Poste ŝi komencis kuiri iom da rizo, rakontante dum la tuta tempo pri siaj malfacilaĵoj. "Mi havas tre malmulte da rizo kaj ne grandan kaldronon," ŝi diris, "alie, mi kuirus por via tuta armeo."

Post kiam la rizaĵo estis kuirita, ŝi ĝin metis antaŭ nin kaj insistis ke ni manĝu. Fine ni manĝis, sed metis

monon sur la tablon por pagi. Ŝi protestis, rifuzante la monon, sed ni diris al ŝi, ke ŝi nepre ĝin akceptu. Ŝi ankoraŭ rifuzis kaj ni ne povis ŝin ŝanceli. Mi eliris kaj trovis kamaradon kiu portis sakon da rizo sur sia ŝultro, kaj tion ĉi ni donacis al ŝi, kaj ŝi ĝin prenis kun senfinaj dankoj; larmoj fluis malsupren laŭ ŝiaj vangoj.


Nia Armeo ankoraŭ vojiris antaŭen malrapide. Sidante antaŭ la kabano mi rimarkis malgrandan bambuaron

post ĝi. Jam estis malfrue en posttagmezo kaj mi sciis ke niaj trupoj detranĉos bambuojn por fari torĉojn; ni jam ricevis ordonon, ke ni devos marŝadi tra la nokto. La maljunulo diris al ni ke sintrovas bambuarego ne malproksime de tie kaj ke ŝia familio bezonas la bambuareton. Mi do elmetis noton malpermesante al iu ajn fortranci ŝiajn bambuojn, aldonante ke bambuarego sintrovas ne fore antaŭen, kie ni povos trovi kiom ni bezonas.

Kiam noktiĝis, ni alvenis al la bambuarego kaj faris torĉojn. Dum ni grimpadis supren tra la mallumo mi aŭdis voĉojn:



Agnes Smedley.



Transiro de la Kinŝa-Rivero ĉe la limo de Sikang-Provinco kaj Tibeto en la Longa Marŝo de 1936.



# Poemo de Maŭ Ze-tung

## La Longa Marŝo

Ruĝan armeon ne timigas longa militir',  
 Sennombraj montoj kaj riveroj ŝajnas ne baril'  
 La Kvin Montĉenoj serpentumas kvazaŭ ondetoj,  
 Dum granda Umeng kaŭras kiel bulo de argil'.  
 La ondoj en la Kinŝa vipas bole la krutajojn,  
 Trans Tatu la fersnura pont' streĝigas kun frostbril'.  
 Jen pasis fine la senlima Minŝan neĝvestita,  
 Kaj jam vizaĝoj ĉiuj radiigas kun jubil'!

Trad. S. J. Zee

Tiun ĉi kuraĝigan poemon verkis k-do Maŭ Ze-tung en la plej malfacilaj tagoj dum la fama longa marŝo 1934-5. Ĝi estas en klasika formo. Ni nomas tiun ĉi versformon 'ci lju' (七律), tio estas okversa poemo en sepsilabaj paraleloj. Ĉiu el la du mezaj versparoj konsistas inter si el versoj ne nur ekzakte kontraŭaj laŭ ritmosistemo, sed ankaŭ ekzakte paralelaj laŭ gramatika konstruo kaj vortordo. La originalajn ritmosistemojn kaj rimaranĝon ni montras per la sekvanta diagramo:

```

- - 0 0 0 - - (a)
0 0 - - 0 0 - (a)
0 0 - - 0 0 (b)
- - 0 0 0 - - (a)
- - 0 0 0 - - (c)
0 0 - - 0 0 - (a)
0 0 - - 0 0 (d)
- - 0 0 0 - - (a)

```

- = altintonacia silabo (平聲)  
 0 = malaltintonacia silabo (仄聲)

Pro la kompleksa formo de la poemo kaj koncizeco de la klasika lingvo, mi ne povas reprodukti akurate la originalan formon. Mi tradukis ĝin en sepjamboj. Ĉar la neparaj (escepte de la unua) versoj finiĝas per malaltintonacio, mi aldonis al ili po unu kromsilabon.

Noto de la tradukinto

Klarigoj:

Kvin Montĉenoj (Uling 五嶺): La montaroj, kiuj kuŝas inter Kiangsi-, Hunan- kaj Kuangtung-, Kuangsi-Provincoj.

Umeng (烏蒙): montaro en la nordorienta parto de Junnan-Provinco.

Kinŝa (Rivero kun Or-sableroj 金沙江): la supra fluo de Jangze-Rivero, precipe tiu parto, kiu trafluas Junnan-Provincon.

Tatu (大渡河): rivero en okcidenta parto de Seĉuan-Provinco kaj orienta parto de Sikang-Provinco.

Minŝan (Min-monto 岷山): granda montaro en la nordokcidenta parto de Seĉuan-Provinco.

"Supren grimpadu!...Rapidu! Ne postigu kiel testudo!...Aj-joh, ni estas grimpantaj tiel alten ke mia kapo estas skrapanta la ĉielon!"

La vojeto estis tiel kruta ke mi povis rigardi rekte la plandon de la homo antaŭ mi. Foje kaj foje la tuta kolono haltis kaj atendis, kaj iom pli poste ĝi tute haltis. Sciigo venis malsupren laŭ la vico ke nia antaŭa kolono estas antaŭ perpendikla klifo kaj tie ne estas vojo por suprenigi la ĉevalojn. Post longa tempo venis malsupren la ordono, ke ni devas dormi kie ni estas kaj daŭrigu la grimpadon je mateniĝo.

Dormi ĉi tie! Kiel tio estus ebla! La montvojo, sur kiu ni estis, estis kóvrita de akraj ŝtonoj kaj ne pli ol du futojn larĝa je ajna punkto. Eĉ se oni sukcesus kuŝiĝi, li ne povus turniĝi en sia dormo sen ruliĝi malsupren laŭ la montflanko!

Mi faldis mian litkovrilon, ĝin sternis sub min kaj penis kuŝiĝi kun kurbigita korpo trans la vojeto. Mi estis tiel laca ke mi efektive endormiĝis! Foje en la nokto la malvarmo vekis min. Mi estis tremanta tutkorpe kaj la malvarmo estis penetranta en miajn ostojn. Mi volvis la litkovrilon ĉirkaŭ min kaj penis volviĝi en malgrandan buĝon, sed mi ankoraŭ ne povis dormi. Mi kuŝis kaj fiksigardadis la brilantajn stelojn en la ĉielo—ili similis al jadaj ŝtonetoj sur nigra kurteno.

Supre kaj malsupre de la vojeto estis malgrandaj fajroj, bruligitaj de batalantaj vekitaj de la malvarmo. Ili sidis ĉirkaŭ la fajroj kaj parolis mallaŭte.

Tel mi endormiĝis denove.

La sekvintan matenon ni daŭre iris pene sur la monton. Estis tiel malfacile kaj malkuraĝige ke nia Politika Departemento sendadis homojn supren kaj malsupren laŭ la linio por fari paroladojn, krei sloganojn kaj ekigi kantadon.

Mia grupo fine atingis la perpendiklan klifon kiu nin haltigis la pasintan nokton. Tiu ĉi klifo estis nomata Lejkungjaj—Tondrodia Roko. Ĝi estis solida bloko de roko pikanta en la ĉielon je preskaŭ 90-grada angulo. Ŝton-ŝtupoj ne pli ol unu futon larĝaj estis enranĉitaj en la klifon kaj sur tiuj ni devis suprengrimpi sen io ajn por teni escepte de la ŝtonklifo mem.

Kiam mia tuta armeunuo jam

pasis, mi sekvis, kaj ĉe la supro ekrigardis malantaŭen. Ĉirkaŭ ni estis maro da montoj, ĉiuj ili estis nanoj kompare kun tiu sur kiu ni estis. Subite mi aŭdis maŝinpaŝilojn krakadi fore malsupre en nia malantaŭo. Estis klare ke nia ariergardo estas batalanta ĉe la loko kiun ni forlasis hieraŭ. De malproksime mi ankaŭ aŭdis ĝemon de aeroplanoj, kvazaŭ ankaŭ ili estus lamentantaj ke ili ne povis iri al la fronto por batali kontraŭ la japanoj anstataŭ kontraŭ siaj propraj samlandanoj.

Estis la dua posttagmeze, kiam nia armeunuo atingis la montsupron. Mi sentis, ke ni devus starigi monumenton tie ĉi notante ke je certa tago en certa monato kaj jaro la Ruĝa Armeo transpasis Tondrodian Rokon.

Sur la malsuprenira vojo de la monto mi vidis multajn belajn vidaĵojn kaj pensis ke ĝi estus mirinda loko por somer-ripozejo de laboristoj. Tie troviĝis belaj arbaroj, kaj klaraj fontoj elsprucis el la montflanko kaj falis en arĝentaj riveretoj.

Maljuna Monto estis la unua monto malfacila, kiun ni grimpis en la Longa Marŝo. Sed transirinte la Riveron de Ora Sablo (Kinŝa-Rivero), la Tatu-Riveron, la Grandan Neĝmontaron kaj la Herbaroĉenojn ĉe la Tibeta limregiono, la malfacila en transiro de Maljuna Monto ŝajnis ja tre malgranda.

—Tradukis Laŭlum

En Ĉinio, se ne estus armita batalo, ne estus pozicio por la proletaro, por la popolo kaj por la Komunista Partio kaj ne povus esti venko por la revolucio.

—Maŭ Ze-tung (1939)



Transvadi la Glacian Riveron en la Longa Marŝo.

## Bonaj Kotonsemoj Anstataŭas la Malbonajn

Signon de la sukceso de ĉina agrikulturo oni povas vidi en la longaj zonoj da koton-kampoj norde kaj sude de la Flava Rivero, kie la plibonigitaj specoj de kotonon rapide anstataŭis la malbonajn.

Rapida progreso vidigis depost 1949 kiam la registaro komencis disvastigi unuafoje la uzadon de altkvalitaj koton-semoj. Ĝis

1950, 20 procentoj de la koton-regionoj jam estas semitaj per tiuj pli bonaj specoj kaj ĉi-jare la tuta kvanto, espereble, atingos 40 procentojn.

La Stoneville\* specoj estas nun vaste kulturataj en Norda Ĉinio, dum la semoj Delfos 531\* estas kulturataj en regionoj de la Jangze-Baseno. Kelkaj specoj im-

portitaj el Sovet-Unio kiuj havas altan produktivon estas sukcese pruvitaj en Sinkiang-Provinco.

Jam antaŭ 1920, aranĝoj por enkonduki pli bonajn koton-semojn en Ĉinion estis faritaj. Sed simile al ĉiuj aliaj projektoj entreprenitaj de la feŭdaj militaristoj kaj Ĉiang-Kajŝeka reĝimo el tio tre malmulte rezultigis. La eksperimentcentroj nur provizis la semojn kaj faris nenion plu. Nun la Popola Registaro zorgas ne nur la provizon de bonaj koton-semoj sed ankaŭ la konservon kaj plivastigon en la sekvanta sezono.

Plue, la centro sendas spertulojn por instrui la terkulturistojn kiel akiri plej riĉan rikolton el la semoj disdonitaj de la centro. Ili ankaŭ instruas la terkulturistojn pri la selektado de semoj kaj helpas la starigon de ilia propra instalaĵo por depreni semojn kaj konservi la bonajn semojn.

Kiam la elektitaj distriktoj estas plene plantitaj per la plibonigitaj specoj, la sama procedo ekfunkcias en aliaj distriktoj ĝis kiam la malbonaj specoj estos forigitaj el la tuta

koton-regiono.

Ĝenerale la procedo progresas pli bone en tiuj regionoj kie la agrara reformo jam efektiviĝis, ĉar la terkulturistoj tie fariĝas tre fervoraj post kiam ili akiris la teron. Celante al plua produktado, ili konkure petas bonajn semojn de la eksperiment-centroj. Depost agrara reformo starigas jam miloj da kooperativoj en la vilaĝoj kaj ili ankaŭ ludas gravan rolon en la disdonado de la semoj.

Estinte ĉinaj terkulturistoj ne volis uzi importitajn semojn ĉefe pro tio, ke tiuj specoj bezonas pli da sterko kaj ne povas bone kreski kontraŭ la insektoj kaj ke ili estis tro malriĉaj por aketi sterkon. Nun la terkulturistoj liberigis de la ekspluatado de la bienuloj kaj ili havas sufiĉan monon por sterko kaj eĉ por kemiaj insektmortigiloj kaj spruciloj. Tiel la agrara reformo helpas al la progreso de ĉina koton-industrio, same kiel al ĉiuj aliaj branĉoj de agrikulturo.

I. K.

\* Novaj specoj de kotonon.



**T**UTLANDA Konferenco de la Artolaboraj Trupoj kunvokita de la Kultura Ministerio de la Centra Popola Registaro en Pekino finiĝis je la 29 de junio post 12 tagoj da diskutado. Artolaboraj grupoj estas unu el la plej fortaj armeoj sur la kultura fronto. Nun en Ĉinio entute estas 305 artolaboraj grupoj inkluzivantaj proksimume 200,000 laborantojn, kaj tio ankoraŭ ne enkalkulas la laborantojn en la armeo. Laŭbezone de la politika tasko ili sukcesis per diversaj artformoj disvolvi grand-skalan kaj profundan propagandon kaj kreis grandan kvanton da eminentaj verkoj kiel teatraĵoj, kantoj, operoj kaj dancoj. En la konferenco oni resumis la sukceson akiritan kaj difinis laŭ la nova cirkonstanco novan direkton — krei novajn operojn, teatraĵojn, muzikon kaj dancojn. La laborkampo de la diversgradaj artolaboraj grupoj estis ankaŭ dividitaj en la konferenco.

**A**PLIKADO de la lingvoj de la minoritatoj kaj kreo por ili skriban formon estas kuraĝigataj kaj vastigataj. Eldonaĵoj en Ĵi-lingvo laŭ latiniga sistemo nun grandkvante eldoniĝas. En Sinkiang-Provinco (新疆省), kie grandparto el la loĝantoj estas ujuvuroj, (維吾爾) la telegrafio ekde aprilo ĉijara akceptas telegramon en ujuvura lingvo transformita en latinaj literoj. Tio ege faciligas la komunikon de la ujuvuroj. Krome, per la latinigo de tiu lingvo kreiĝas natura kondiĉo por ĝia reformo.

**J**E la 5a de julio ekveturis la ĉinaj reprezentantoj por partopreni la 6an Internacian Filmofeston en Karlsbad, Ĉeĥoslovakio. Ilin gvidis k-doĵ Ŝih Tung-ŝan (史東山), la produktinto de "Novaj Herooj kaj Heroinoj", (新兒女英雄傳) kaj Ĉang Ŝui-hua (張水華), produktinto de la fama filmo "La Blankhara Knabino" (白毛女). Por la filmofesto ili portis kun si tri rakont-filmojn kaj du dokumentajn kaj ankaŭ kelkajn aliajn. Ili estas: "La Blankhara Knabino", "La Ŝtalaj Batalantoj" (鋼鐵戰士), "Novaj Herooj kaj Heroinoj", "La Granda Unuiĝo de Ĉinaj Nacioj" (中華民族大團結) kaj "Batalantoj de la Landlimo" (邊疆戰士). Laŭ lasta informo la filmo "La Ŝtalaj Batalantoj" jam ricevis la "pacan premion," la duan el la ĉefaj premioj de la Internacia Filmofesto kaj laŭdon de la vasta rigardantaro kaj prezidanto de la Prijuĝa Komitato, ke la venko kaj sukceso de la ĉina popola liberiga batalo sub gvido de granda Maŭ Ze-tung fariĝas jam la plej granda garantio por la mondpaĉo.

**E**N la kuranta jaro ĉiuj studentoj dipolimitaj en la altaj lernejoj trovas sian laboron en la

tutlanda konstruado de nova Ĉinio. Por tio la Centra Popola Registaro faris detalan planon. En Pekino organiziĝis eĉ somera kurso por 2,600 studentoj en Nord-Ĉinio por doni al ili necesan scion kiel bone plenumi sian taskon. Laŭ la plano unue oni devas kontentigi la bezonon de laborantoj en la entreprenoj koncerntaj nacikonstruon kaj due la bezonon de kadroj en la diversaj organizoj, ĉar la nombro de la diplomitaj studentoj nun estas nur dekono de la bezonataj laborantoj en la vasta konstruado. Tio ja akre kontrastas kun la stato sub Kuomintang-a reĝimo, kiam cirkulis en la studentoj diro "Diplomite el la universitato, oni devas vagi sur la strato."

**D**LI ol 200 literaturaj laborantoj en Pekino okazigis je la 3a de julio rememoran kunvenon pri G. Dimitrov, la gvidanto de Bulgara popolo kaj granda batalanto de internacia komunismo. La kunveno kunvokis k-do Hung Sen (洪深), la estro de Interrilata Buroo de Kulturaj Aferoj kun Fremdaj landoj. Ĉin honoris ankaŭ Petrov, ambasadoro de Bulgario. K-do Ĉou Jang (周揚), vicministro de Kulturaj Aferoj, akcentis en sia parolado la neceson lerni de k-do G. Dimitrov la brilan ekzemplon pri intima kunligo de internaciismo kaj patriotismo, la sentiman spiriton kaj la brilan revolucionan personecon. Ĉe la fino de la kunveno oni prezentis filmon pri la enterigo de G. Dimitrov.

**S**ES novaj dokumentaj filmoj estas produktitaj de la Pekina Filmo-produktejo: 1) Goĵo en Sinkiang-Provinco (歡樂新疆), 2)

**Veron Oni ne Povas Kovri**

Karaj samideanoj,

Kun dankoj mi ricevis viajn bonegajn gazetojn.

Ili ĉiam min kuraĝigas kaj vigligas en batalado por la paco, kiun ĉiuj popoloj arde amas.

Leginte la lastan numeron (n-ro 5) mi ne povis ne esprimi mian miregon kaj ĝojegon ke ĉinaj popolanĵoj tagon post tago marŝadas fortpaŝe al rekonstruado de sia patrolando, kie antaŭe japanaj militistaj barbaroj superregadis per senlima ekspluatado al ĉina popolo kaj postmilita Kuomintanga reakciopotenco denove suferigis la popolon, kaj nun Usonaj senhontaj invadantoj bombardas per siaj aeroplanoj.

Spite de la intrigoj de Usonaj imperiistoj kovri veron de nova Ĉinio, vero kaj brilanta sukceso de nova Ĉinio jam estas nekaŝebla al ĉiuj popoloj de la mondo.

Via "El Popola Ĉinio" nun ja plenumas la grandan taskoon por frakasi malveran propagandon pri Ĉinio fare de la imperiistoj kaj iliaj hundaĉoj.

Preskaŭ ĉiun numeron de via gazeto mi legis en mia laborejo kune kun miaj gekolegoj kaj parto el la artikoloj mi voĉlegis tradukante japanlingven al ili por ke ili povu scii ĝiajn interesplenajn enhavojn, interalie pri kondiĉoj de la ĉinaj laboristoj...

Mi tutkore salutas vin.

via S. T.  
el Japanio

**Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!**

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kriptigitaj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

- 1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.
- 2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.
- 3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

Batalantoj de la Landlimo (邊疆戰士), 3) Kongreso de la Herooj (羣英會), 4) Artintersanĝo inter Ĉinio kaj Koreio (中朝文化交流), 5) Honoraj Postenoj (光榮崗位), 6) Riparo de la Alta Forno (修高爐). Tiuj filmoj bone respegulas la naturan riĉon, la harmonion inter la nacioj en Sinkiang-Provinco, la agrikulturajn laborojn de la batalantoj en Sinkiang-Provinco, la kongresojn de la labor- kaj batal-herooj kaj ceteraj.

**P**OR akceli la intersanĝon de kulturo kaj pli intimiĝi kun la popoloj en la frataj landoj Ĉina Filma Kompanio decidis intersanĝi

filmojn kun Sovetio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Germanio kaj Pollando. Al tiuj landoj ni sendos: Radioj Senkomparaj (光芒萬丈), Nevidebla Batala Fronto (無形的戰綫), Ĉinaj Filinoj (中華女兒), Ĉau Ĵi-man (趙一曼) kaj aliaj kaj reciproke ni ricevos de ili eminentajn filmojn de la respektivaj landoj.

**D**E post la liberigo en Kuangtung-Provinco (廣東省) fondiĝis jam 862 elementaj lernejoj por naciaj minoritatoj. Al tiuj lernejoj aliĝis pli ol 28,000 lernantoj el la naciaj minoritatoj Miaŭ-oj (苗), Li-oj (黎) kaj Ĵaŭ-oj (僑) disloĝantaj en Norda Kuangtung-Provinco kaj Hajnan-Insulo (海南島).

**Saluto el Bulgario**

Karaj kamaradoj,

Hodiaŭ mi ricevis la majan numeron de "El Popola Ĉinio". Koregan dankon!

Mi tre ĝojas, ke la esperantistoj havas nuntempe unu vere progresema gazeton, kiel la vian "El Popola Ĉinio". Ĝi estas la bazo de la estontaj progresmaj esperanto-gazetoj en la tuta mondo. Ĝi estas vera heroldo



de la progresema internaciismo, de la proletaria patriotismo. Kune kun la aliaj progresmaj esperanto-gazetoj de la popoldemokratiaj landoj ĝi batalas por paco. Per ĝi la esperantistoj povas konatiĝi kun la nova konstruado kaj vivo en la Nova Ĉinio de Maŭ Ze-tung. Per ĝi la propagando de esperanto disvolviĝos en ĉiuj landoj de la mondo.

Akceptu, karaj kamaradoj, miajn plej koregajn salutojn kaj bondezirojn kaj la salutojn de ĉiuj bul-

garaj gejunuloj, membroj de la Dimitrova Unuiĝo de la Popola Junularo.

Via Veselin Jordanov  
el Bulgario

**Falsan Socialiston Ĉiuj Denuncas**

Karaj amikoj,

Ĝuste kiel vi diris pri Esperantomovado ĉi tie en Okcidenta Eŭropo kaj Ameriko. Ĝi troviĝas ne nur en la manoj de etburĝaj ŝercemuloj ktp. sed eĉ en la manoj de malamikoj al la laboristaro kaj al la novaj demokratiaj kiel la Ĉina Popola Respubliko. Ekz. en "Sennaciulo" la ĉiumonata organo de SAT, aperis tia artikolo. En ĝia maja numero aperis artikolo titolita "Kiel defendi la homajn rajtojn". La "socialisto"-verkisto de tiu artikolo aŭdacas eĉ skribi, ke en ĉiu lando, kie la kapitalismo estas parte aŭ tute neniigita, la laboristaro eĉ ne havas elementajn rajtojn. Tiuspecaj artikoloj lastatempe en Sennaciulo abundas. Nuntempe tiu "socialista" organo aktive apogas la spiritaĵn militpreparojn de manpleno de anglo-usonaj banditoj, kiuj bezonas kalumniojn, mensogojn kaj fasismon por iniciati novan mondmiliton. Sed estas esperdona signo, ke lastjare tiu SAT perdas multegajn anojn. Tion klare montras la SAT-ĵarlibroj de 1849 kaj 1950-1951. La ĉi tiea esperantistaro evidente ne lasos sin eterne trompita.

Ru Bossong,  
el Holando.